



Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, redakcioj de gazetoj kaj radiostacioj, listoj kaj unuopuloj.

[Estrara Komunikado EKO 2015-12 sendita el Italio la 6an de aprilo.](#)

Jen raporto pri la lastaj tri tagoj de AMO 10 kun rezultoj el la laborsesioj kaj rekomendoj. Ni pardonpetas pro la longo, sed ni ne rajtas kaŝi seminariajn rezultojn en ŝrankon, kaj preferas sendi unu komunikon ol tri. Ĉiuj fotoj de Floreal Martorell.

Tago du: Decidofarado

Same kiel en la unua tago, la la dudeko da seminarianoj kaj gvidantoj sidis en rondo, diris sian nomon kaj aldonis unu/du frazojn pri la propraj metodoj aŭ malfacilaĵoj fari decidojn. Sekvis situa ekzerco rilate al la bezono transvivi post aviadilkraŝo en nordkanadaj frostejoj; ĉiu ricevis paperpecon kun deko da objektoj kaj devis rangigi iliajn gravecon por transvivo. Post unuopa decido, ĉiu en du grupoj devis prezenti siajn solvojn kaj per diskutado dum 15 minutoj veni al komuna grupa solvo. Reveninte al la pleno, la diskuto pluiris per la starigo de kelkaj demandoj: Kiel vi venis al komuna decido? Kio influis viajn decidojn? Kiel vi traktis konfliktojn (se leviĝis)? Pri komuna decido: helpas unue konsenti pri la celoj, tiel pli facilas konsenti pri la rimedoj. Pri influoj: povas egale influi la personecforto de iuj grupanoj, kompare al la forteco de la argumentoj. Por trakti konfliktojn, iuj voĉdonis, aliaj diskutis ĝis atingo de konsento. La ekzerco utilis ĉar ĝi devigis la atingon de grupdecido ene de tempolimo, kaj fari decidon surbaze de tre malkompletaj informoj. Ĝis la paŭzo oni diskutis en la plena rondo, kiaj estas la faktoroj, kiuj influas decidofaradon ĝenerale – inter ili povas esti religiaj aŭ kredaj faktoroj, ankaŭ la influo de amaskomunikiloj aŭ amikaj aŭ laborejaj aŭ similaj rondoj.

Postpaŭze, ĉiu ricevis la taskon elpensi realan decidon, kiun oni devos fari en baldaŭa estonto. Sekvis konciza prezento de kvin decido-strategioj, kiuj estis skizitaj aŭ bildigitaj sur kvin paperpecegoj en diversaj anguloj de la salono. La seminarianoj ricevis la taskon vagi libere inter la paperoj (stacioj) kaj decidi, kiu aŭ kiuj el la strategioj pleje helpas por solvi la konkretan problemon. Jen resumo de la kvin stacioj.

1. Defi-analizo

Unue difinu la defion, due listigu diversajn solvojn, pripesu la sekvojn por ĉiu unu post unu.

2. Ses ĉapeloj

Rigardu al la problemoj laŭ ses aliroj por havi pli da diverseco de solvoj, el kiuj fine elektu. La ses aliroj koncizigite estas: (blanka ĉapelo) analizo de faktoj kaj datumoj, (verda ĉapelo) apliko de kreemo, (blua ĉapelo) sistemo-procezo - tuteca alrigardo al la problemoj, (ruĝa ĉapelo) instinkto, sentoj kaj emocio, (nigra ĉapelo) negativa aliro – riskanalizo – kio povas misiri kaj (flava ĉapelo) avantaĝoj kaj harmoniserĉado.

3. FLAM-analizo

Fortoj, Lamaĵoj, Avantaĝoj, Minacoj. Fortoj kaj Lamaĵoj rilatas al faktoroj, kiujn vi individue aŭ grupe povas ŝanĝi. Avantaĝoj kaj Minacoj rilatas al eksteraj faktoroj, apenaŭ modifeblaj, sed kiuj influos neeviteble la sukceson de viaj decidoj.

4. Trejnistaj taktikoj

Aliru la problemon alimaniere: Kion farus via idolo? Kazo de miraklo: imagu la problemon solvita – kiel tio povis okazi, kio diferencus inter problemo kaj solvo? Paradoksaj demandoj: Kio fareblus por plimalbonigi la problemon? Kiu estis la malplej bona decido farebla? Ktp.

5. La pesila aliro

Listigu la avantaĝojn kaj malavantaĝojn de eblaj decidoj.

Denove, la sesia fermo konsistis el rondiro en la pleno kun la demando: kion vi hejmen portos el la nuna sesio?

Tago tri: Konflikto-solvado

Refoje la tagmalferma ekzerco estis rapida rondiro en la pleno: kion vi volas lerni el la hodiaŭa sesio? Sekvis valora ekzerco: ĉiu ekstaris kaj elektis parulon. La gvidanto, Eliza Popper, donis unu demandon, kiun la paro diskutu dum du mintuoj. Poste, oni formis alian paron, kaj traktis duan demandon. Kaj tiel plu, tra naŭ demandoj:

1. Kiel vi difinas konflikton?
2. Kio estas via tipa reago al konflikto?
3. Kio estas via ĉefa forto, kiam vi traktas konflikton?
4. Se vi povus ŝanĝi unu aferon en via konflikto, kiu ĝi estus kaj kial?
5. Kio estas la plej grava rezulto de konflikto?
6. Kiel oni povas profiti de konfliktoj?
7. Kiuj povas esti la negativaj sekvoj de konfliktoj?
8. Kion vi povos fari, kiam iu evitas konflikton kun vi?
9. Pro kiuj kialoj vi evitus konflikton?

Bonaĵo de la ekzerco estis, ke ĉiu povis kontinue paroli, kaj praktike ĉiu havis okazon paroli kun ĉiu alia; abelzuma babilbruo plenigis la aeron tra la tuto. Post la naŭ pardiskutoj, oni revenis al la pleno kaj pritaksis la ekzercon. Konstatite, ke plejparte la paruloj havis similajn opiniojn, sed ne ĉiam.

Sekvis konflikt-simula ekzerco denove en paroj, bazita sur la ludo ‘papero-ŝtono-tondilo’. Post korusa diro ‘nenio, io, io ajn’, ambaŭ paruloj diras samtempe vorton. Ili sekve devas debati (diskuti/disputi), kiu vorto ‘venkas’ la alian. Poste oni ripetis la ekzercon kun instrukcio ne debati, sed dialogi. Poste en la pleno oni diskutis la diferencojn inter la du ludoj. Dialogi implicas interparoli cele al trovo de komune akceptebla solvo, dum debato pli taŭgas por la eldiro de propra opinio. Sekva pripensio: kiel transformi debaton al dialogo?

Lasta antaŭpaŭza aktivaĵo: en tri grupoj, diskutu pri konflikto-solvado sen uzi negativajn vortojn (negative gramatike kaj emocie). Grupoj protokolis kaj rereportis al la pleno. La malpermeso uzi negativajn vortojn ja modifas la vidpunktojn pri konfliktoj, kiuj estas kutime taksataj negativaj.



Post la paŭzo en tri grupoj oni elpensis situacion kaj devis aktori ĝin trifoje, unue kun bona rezulto, due kun malbona rezulto, trie kun katastrofa rezulto. La tria versio permesis al iuj seminarianoj demonstri siajn aktorajn talentojn, kaj (bedaŭrinde) oni konkludis, ke la ‘katastrofa’ versio estis pli amuza kaj distra ol la aliaj. Post la plenumoj en la grupoj, ĉiu grupo reaktoris siajn versiojn

Sekvaj du fotoj: Dramoj nun pacaj sed klare survojaj al katastrofoj.

por la pleno. Fine, taksado de la aktorado kaj diferencoj inter la versioj. Sekvis la kutima sesiferna demando: Kion vi hejmenportos pro la hodiaŭa sesio?

Tago lasta: Streĉo-mastrumado

Monda Kafejo. Tiu komenca aktivaĵo daŭris 30 minutojn, kun tri diversaj temoj. Oni sidiĝis ĉirkaŭ tabloj kun afiŝoj, kiuj prezentas la temon kaj havas spacon por alskribo de respondoj kaj pensoj. Seminarianoj restis 10 minutojn en unu kafejo, kaj poste devis migri al la du pliaj kafejoj; tio estis aranĝita tiel ke oni en ĉiu kafejo renkontu aliajn personojn.

Kafejo 1:

Reagoj al streĉo – kiel vi reagis?

Kafejo 2:

Kialoj, fonoj kaj kaŭzoj kaj de streĉo: pozitivaj kaj negativaj.

Kafejo 3:

Efikoj de streĉo – pozitivaj, negativaj, mense, korpe, anime, kondute, laboreje, alie...



En dua ekzerco, ĉiu en plena rondo ricevis paperpecon kaj devis skribi kelklinie pri iu problemo (reala el la lastatempa vivo) kiu estis

streĉiga. Poste, la paperoj estis arigitaj kaj redisdonitaj, kaj ĉiu ricevis alies problemon, al kiu oni devis skribe proponi konsilojn kiel aliri la problemon kaj kiel trovi elirvojon aŭ solvon. Plurfoje la paperoj migris al maldekstra najbaro, tiel ke ariĝu longa listo de konsiloj.

En tri grupoj oni diskutis, surbaze de la skribaj respondoj al du demandoj:

- Kion vi povas fari por helpi al aliaj eliri streĉan situacion.
- Kion vi povas fari por helpi al vi mem eliri streĉan situacion.

Rekomendoj de la seminario

La ferman sesion gvidis Sara Spanò, Veronika Poór kaj Stefan MacGill. La rekomendoj estas adresitaj (se ne aliel notite) al unuopuloj, klubanoj kaj agantoj en landaj aŭ fakaj asocioj.

Tempo-mastrumado

- Listigu fendaĵojn kaj pritaksu ilin laŭ graveco, urĝeco kaj facileco de plenumo.
- Plenumu unue taskojn, por kiuj vi vidas klaran, rapidan solvodon – tio estu varmiga ekzerco.
- Aranĝu bone vian laborlokon por forigi ĝenajn, interrompajn faktorojn.
- Konservu tempon por ripozo kaj ŝatokupoj – tio ne estas perdita tempo.
- Antaŭ ol lanĉi novan inciaton, esploru ĉu aliaj similaj projektoj ekzistas.

Decidofarado

- Rigardu la decidendaĵon el diversaj flankoj
- Konu variajn alirojn al decido-farado: laŭ racio, instinkto, ktp
- Starigu limdatojn por fari decidojn – precipe la urĝajn.
- Bone imagu la gamon da rezultaj situacioj post la farota decido.
- Kaze de grupaj decidoj, unue konsentu pri la celo, poste pri la rimedoj.

Konflikt-solvado

- Konfliktoj ne estas nepre negativaj – ili povas pliklarigi sintenojn kaj irendajn vojojn.
- Apartigu homojn de siaj ideoj.
- Trankviliĝu – dialogo estas pli utila ol kverelo.
- Konu la diferencon inter debatado kaj dialogado – provu gvidi aferojn de la unua al la dua.

Streĉo-mastrumado

- Ne provu fari tro pli ol vi kapablas. Elektu kaj delegu.
- Petu konsilojn de amikoj, kolegoj, ankaŭ (se eble) de apenaŭ konatuloj.
- Ioma streĉo necesas por aktivi signife. Malofte eblas streĉon foriri – lernu mastrumi ĝin.
- Faru regule paŭzojn aŭ ŝanĝojn, ofte solvoj venas dum tiuj minutoj, tio mildigas streĉon.

Ĝenerale

- Partoprenu trejnadojn – bonkvalitaj trejnprogramoj ekzistas en Esperanto.
- (al trejnistoj) Afiŝigu ĉiujn raportojn, materialojn, helpilojn en la reto.



Meze de grupdiskutoj.



Gvidantoj: Eliza Popper
gestante kaj Veronika
Poór alrigardante.



Plimulto de la partoprenintoj pozas por grupfoto.

Trajtoj de la seminario?

La partoprenantoj restis rimarkinde samaj de tago al tago – la kunligiĝo de la tagaj temoj pli fortis ol kutime en AMO-seminario – dank’ al la sama gvida teamo ĉiusesie (Eliza Popper, Veronika Poór). La grado de aktivigo estis pinta – ĉiam temis pri unuopa, para aŭ grupa laboro – en la pleno okazis nur diskutoj kaj pritaksoj. Tra kvar tagoj, neniuj vorto de tradicia prelego. Aparte valoris, ĉar ni uzis Esperanton por trakti gravajn kaj realajn problemojn el la ĝenerala vivo, kiuj tamen portas utilon al movada agado.

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>>.

6an de aprilo (lasta seminaria tago). SMG: Vortoj 1470.